Olomouc – Slovanský dům, 1a 7-an de januaro 1956

---------------------------------------------------------------

Sabate vespere rapide pleniĝis la ĉefa halo de Slovanský dům en Olomouc de Esperantoj el ĉiuj regionoj de ČSR. Kaj 10 minutoj post la 20-a horo eksonas la unuaj tonoj de „La Espero“. Presidanto de E-klubo en Olomouc, s-ano D-ro Mohapl salutas la ĉeestantoj kaj bonvenigas gastojn el Jugoslavio, oficialajn gastojn kaj malfermas.

## A R T A N   V E S P E R O N

S-ano Stanislav Ř í m s k ý konigas al la ĉeestantoj la gloran historion de la reĝa urbo Olomouc kaj post lia mallonga parolado sekvis jena arta programo, kiun preparis Esperantistoj el Olomouc;

1/ Arioj kaj duetoj el la opero „Vendita fianĉino“<br>/ el gramodiskoj /<br>
2/ A. Dvořák: „Najado“ ario de Nikso .......... Vl. Ott / baso /<br>
3/ A. Dvořák: „Najado“ ario de princo .......... Zd. Švehla / tenoro /<br>
4/ Puccini : „ Butterfly“ .......... Dr.Královcová / soprano /<br>
5/ Bizet : „ Carmen“ ario de Escamillo ...... Vl. Ott / baso /<br>
6/ B.Smetana: „Vendita finanĉino“ dueto de Jano<br>kaj Marinjo ......... Zd.Švehla – Dr.Královcová<br>
7/ G. Verdi : „Aida“ dueto de Aida kaj Radames<br>Dr.Královcová – Zd.Švehla<br>
8/ Schubert : La trankvilo ........... Vl. Ott<br>Ĉiuj solistoj de la Ŝtata opero en Olomouc.<br>
2 – 8/ ĉe fortepiano muzikestro de Ŝtata opero en Olomouc K. Moor.<br>
9/ „Nelly Gray“ ........... Jiří Švec<br>
10 - 12/ Ksilofono kaj piano ............ ludas gefratoj Francisko kaj Marinjo R e k, la plej junan esperantistaj artistoj, anoj de la JUNULARO en Olomouc.

Pli ol 200 ĉeestintoj vidis kaj aŭdis programon, indan por tutŝta kongreso. Per aplaŭdego kaj bukedoj esprimis la ĉeestintoj sian dankon al ĉiuj artistoj, precipe al s-ano Zd. Švehla, kiu ĉi tiun programon preparis. Reĝisoradon havis s-ano Miloš Rudolf.

- x x x -

La ĉefan laborkunsidon de la Konferenco de E-rondetoj el regionoj Olomouc kaj Ostrava, okazintan dimanĉe la 8-an de januaro 1956 en salono de uzinklubo de Ekonomia entrepreno de urbo Olomouc partoprenis entute 153 delegitoj el 43 lokoj de nia republiko. /Regiono Olomouc 52 delegitoj el 11 lokoj, regiono Ostrava 58 delegitoj el 14 lokoj, regiono Brno 23 delegitoj el 4 lokoj, regiono Gottwaldov 9 delegizoj el 4 lokoj, regiono Jihlava 1 delegito, bohemiaj regionoj 7 delegitoj el 6 lokoj kaj slovakaj regionoj 3 delegitoj el 2 lokoj /. 2 eksterlandaj gastoj – reprezentantoj de Jugoslava Esperanto-Federacio, D o b č n i k Matko, redatoro de la gazeto „Kontakto“ kaj K o č e v a r Ivanka, ambaŭ el Celje.